

L'ALVOKO

OFICIALA ORGANO
DE LA
KEBEKA ESPERANTO-KLUBO

NUMERO 7-

30-an de Januaro 1963

LA PERIOJ HEJME

Ci tiun jaron, por la unua fojo, mi nokto festenos ĉe mia unuenaskita filino ĉar de multaj jaroj ni solenis hejme. La tago de la Kristnasko, miaj geliloj kaj genepoj trapasas la tagon ĉe mi. Dum la posttagmezo okazas la disdonado de la donacoj kaj mia okjara filo Claude ilin distribuas. Se vi vidus tiujn infanojn, kiuj svarmas kaj rigardas ĉies donacojn, ili estas tiom gajaj, ke oni povus pensi, ke ĉio estas ilia.

Jen andkdoto kiu okazis al unu el miaj filinoj. Siaj gebaptopatroj venis hejmen por fari donacon al ŝi. Malferminte la kesteton, ŝi trovis vitran arbobulon. Ŝi dankis la donacintojn kaj rigardis sian fratinton kun mal-feliĉa mieno. Sia baptopatrino rimarkis ŝian ĉagrenon kaj sugestis, ke ŝi frakasu la bulon. Tion ŝi tiuj faris. Inter la disaj pecetoj de la vitra bulo, ŝi trovis monon.

Post la vespermanĝo, ni enlitigas la infanojn kaj ĉiuj kartludas ĝis frue en la mateno.

Kia ĝoja festotempo tio, kie la familianoj kunvenas; la ĝojo kaj la feliĉeco vidiĝas sur ĉiuj vizagoj.

Al ĉiuj la klubanoj, mi bondeziras felicitan novjaron.

S-ino J. Rondeau.

ONI VIZITAS NIAN KLUBON

Por la profito de tiuj membroj, kiuj ne povis ĉeesti la lastan renkontigon de Esperantistoj, la jeno estas mallonga raporto pri tiu okazaĵo.

Vendredon, la 18-an de Januaro alvenis ĉe la hejmo de nia prezidantino S-ino Yvette Doré tri bone konataj esperantistoj, nome S-ino Thérèse Héroux el Tri-Rivieroj, S-ro Kenneth Price nun el Toronto kaj D-ro John Mayer el Hamiltono.

Dum trinkoĝua periodo, la trio renkontiĝas kun la novebakitaj esperantistoj kaj priparolas diversajn temojn, interalie malvarmon, neĝon kaj kompreneble esperantismon.

Post invito de la prezidantino, D-ro Mayer faris paroladon, kiun oni registris sur sonbendon. Dum tridek ĉeestantoj tutorele aŭskultis, D-ro Mayer Parolis dum kvindek minutoj pri la Kanada Esperanto-Asocio (K.E.A), la Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.) kaj pri la ĉiujara landa kongreso.

Ekzemple, pri la K.E.A. li bonvole klarigis, ke inter la multnombraj kialoj de la ekzisto de la Asocio, ĝiaj ĉefaj zorgoj estis: 1.- La propagado de la Esperanto-movado tra la lando pere de televiditaj kaj radiodissenĉitaj intervjuoj, pere de jurnalaj artikoloj, ktd; 2.- La semado de nia koncepto en la nivelo de la kulturoloj kaj de la universitatuloj, disdonante ekzemplerojn de la Asocia Organo al la publikaj bibliotekoj, kaj al la universitatoj. Tiurilate, ek de ĉi-jaro, la Asocio penos publikigi tri-lingvan specialan numeron por trafi pli grandan nombron de legontoj.

Poste, D-ro Mayer situaciigis la rilatojn de la K.E.A. kun la U.E.A. ilustrante, ke la U.E.A. pli-malpli estras la diverslandajn asociojn kolektante de ili ĉiajn informojn priesperantajn tra la mondo. Tiam oni lernis, ke estas ĉies respondeco subteni la Universalan Asocion abonante la revuon "Esperanto". Pri kio koncernas nin, oni sciis, ke nia landa asocio rajtas unu voĉdonon po 150 anoj aktavaj. Nuntempe la landa asocio havas nur 187 membrojn. Eĉ se tiu nombro malpermesas al ni fanfaroni pri nia grupo, oni ne devas senkuragiĝi sed kontraŭe, pli entuziasme kaj pli energie laboradi.

Fine, pri la ĉi-jara kongreso D-ro Mayer anoncis, ke la landa asocio intencas okazigi la Kongreson en nia provinco (espereble ankoraŭ ne "ŝtato") kaj eĉ eble en nia urbo. Tamen antaŭ jesigi la aferon oni devos pridiskuti numerajn problemojn i.a. distancon, daton, cirkonstancojn, ktp.

Paroli post "eminenta eminentulo" sufiĉas por naski Komplekson de malplivaloreco sed mi tamen riskis danki la preleginton en la nomo de nia klubo kaj mi tuj invitis S-ron Kenneth Price.

Ankaŭ li sperte ĵetis lumon en la kunsidojn, ilustrante lumbildojn, kiujn li mem fotis dum tralanda vojaĝo. Tiamaniere oni renkontis aliprovincajn kaj ĉarmaspektajn samideanojn el Vinipego kaj Saskatĉevano. Parenteze, mi kaptas tiun oportunun por transdoni la salutojn de la kebekurbaj esperantistoj kaj inviti ilin por viziti nin laŭeble.

Kenneth ankau profitis la oportunan cirkonstancojn por anigi kelkajn ĉeestantojn kaj samtempe vendi esperantajn librojn.

Ĉi-tie finiĝas la serioza parto de la vespero kaj nun estas tempo por pli senprotokole distri sin. Kiel akademiano, mi tre ŝatus bombaste bildigi al vi tiun gajan atmosferon, mallakonece priskribi la diversajn voluptoplenajn modojn de la "skuiĝdanco", senerare transskribi la gajplenajn mienojn, kiujn oni povis legi sur la vizagoj sed mi devas konfesi, ke mia vortkono neniam kapablas traduki en vortojn tiom paroksisman momenton.

Tamen lasu min diri, eĉ se en malkatedraj vortoj, ke tiom sukcesplenaj ferietoj fariĝas pli kaj pli malmultnombraj kaj en la nomo de ĉiuj mi emfaze dankas nian prezidantinn Yvette, ŝian edzon Noel kaj ankau ŝian filinn "Miquette", kiuj senŝpare kaj zorgeme preparis ĉion.

Mi volas sincere danki ankau S-on Price kaj S-on Mayer kun S-inon Héroux por ilia vizito al nia modesta klubo sciante, ke aakau ili faris multon por la anoj de la

KEBEKA ESPERANTO-KLUBO

Jacques Gaucher

INTERURBAN RENKONTIGO - DIMANĈO - la 16-an de DECEMBRO

Granda nombro de Esperantistoj akceptis la inviton de S-ino Thérèse Héroux por festi ĉe la Radison-A Klubo.

Oni vespermangis, oni folklordancis, oni sociludis, kaj oni distribuis donacojn.

Dankon al la organizintoj pro tio interesplena rendezuo, kiu okazigis multajn agrablajn konstifojn.

ONI FUNEBRAS

La Duan de Januaro mortis S-ro R. Carrier, edzo de nia bona samideanino J. D'Arc.

Unuvoce la membroj de la K.E.K. transdonas siajn kondolencojn kaj ofertas fervorajn preĝojn por la ripozo de lia animo.

PASANTE

Pasante sur la mortintaj folioj,
Mi fosas, per miaj piedmarkoj,
La kruelan signon de vivo pasinta,
Kurante al iu mistero estonta.

Kurante sur la moviĝemaj sableroj,
Apud la maro plena de ĵongloj,
Mi fosas avenuojn tra la ĉielo vasta,
Vagante kun stelo en sfero plaĉanta.

Vagante sur la realaj stratoj,
Serpentataj, kiel ĉarmistoj,
Mi revidas la celon kun tempo ŝanĝita,
Pasante sur foliaro mortinta.

F. Vianney Belduc, F.C.

LA UNUA NEGO

Atentigu l'orelon, Dormas la vento,
Kaj tute malproksime, en densa nokto,
Kvazau gigantaj skeletoj, ĉiuj arboj,
Sin kovras per ege blankaj nego paltoj.

Malfermu la pordon. La tempo varm' estas,
Ĉio ripoz' estas, kaj ĉio silentas,
Ĉi vidu! Exploru! La ĉielo helas,
Ĉie ĉio brilas, ĉio diamantas,
La Unua nego el ĉielo falas,
Kaj kiel tapisco, ĝi disetendiĝas.

Eliru! Envenu sur la trementan ter'
Akcelu la paŝon, Kia dolĉa ĝojo!
Malgaje eksi ĝas la autuna vesper'
Falintaj folioj, por la lasta fojo,
Fensigas la horojn, kiaj nin kortuŝas.

J. d'Arc Carrier.

ONI NOTU:

Pro manko da spaco oni bonvolu legi la artikolon
de S-ino Hardouin en la venonta eldono de l'Alvoko.

de: S-ro Vincent Beaupré.

HORIZONTALALE

- 1 - Fari kavajon eltirante teron - Piedvesto - Persekuti bestojn por ilin kapti au mortigi.
- 2 - Patro de patro - La restadejo de Dio - En Reno.
- 3 - Cifero (inverse) - adjektivo - Cifero - Daniel Gilman.
- 5 - Kiomo de la tempo pasinta depost la naskiĝo - En Perei - Kolektivaj adjektivo (inverse).
- 6 - Sati kare iun - Senpeka pri seksaj aferoj - Adjektivo.
- 7 - Martha Ostense - Konjunkcio - En mistiko - Sufikso.
- 8 - Moviĝi de iu loko al alia - Ekstera distingilo - Adverbo (Miksas literoj).
- 9 - Sufikso - Pronomo - Membro de grupo (inverse)
- 11 - Sufikso - Prepozicio - Imperativa formo de ami - Konjunkcio.
- 12 - En Bani - Fari Akutan muzikan sonon, elovante tra lipej - Ne firma (apostrofita).
- 13 - Arbo konifera - Rifuzi - Ronki.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
1													
2													
3													
4													
5													
6													
7													
8													
9													
10													
11													
12													
13													

VERTIKALE

- 1 - Sekcio - Sati kare iun - Ulaĉa.
- 2 - El la Kokino - Sense ami - En Gabio.
- 3 - Simon Ochs - Fariĝi - Sufikso - Pronomo.
- 5 - Adverbo - Ne esti plu (apostrofita) - Estigi ion (apostrofita, inverse)
- 6 - Pronomo - ĝojarila aspekto - Cifero (inverse)
- 7 - Du vokaloj - Pronomo - Sufikso (inverse) - Komuna prepozicio,
- 8 - Vivanta estaĵo (inverse) En instituto (inverse) - En Afikso.
- 9 - Frankcio - En atomo - En Literumi.
- 11 - Sufikso - Drinkaĵo (Apostrofita) Havanta la senon de ino - Sufikso (inverse).
- 12 - Konjunkcio - Konstanta - Konstruaĵeto (Apostrofita)
- 13 - Objekto por parte fiksi ion - Kolekto - Konsenti.

SOLVO DE LA ANTEŬE PROBLEMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16
1	K	R	U	C	V	O	R	T	E	N	I	G	M	O	J	N
2		L	A		F				G			I	S			
3	L		O		F	I		M	A	P	I		A		R	K
4	E			L	A	C		A	F	E	K			E	A	R
5	K		E	A	L	I			R	I		N	A	S	S	
6	T			F	D	R		A	F	E	R			R	O	G
7	I		I		I		I	L	I	B		P		J	E	
8	V		S	B		G				A		L	E		N	
9	A	U	T	O	B	I	O	G	N	A	F	I	I	S	T	